

Unua jaro n-ro 3
Oktoebro 2016

umjio

*Trovu kaj kontaktu
proksimajn esperantistojn.*



Saluton!

Jen la tria numero de la plezura revuo Umujo, verkita de amika rondo de volontuloj.

Leganto demandis, ĉu la materialo de Umujo estas libere uzebla, ekz. en alia esperanto-revuo. Jes, ni publikigas ĉion kun libera licenco. Laŭ la licenco, sufiĉas mencii la nomon de la aŭtoro. Bonvolu ankaŭ mencii (eble kun ligilo), ke vi prenis la artikolon el Umujo.

Ni planas publikigi la artikolojn ankaŭ voĉlegite. Ni volas per tio atingi ankaŭ homojn, kiuj preferas frandi nian revuon aŭde. Krome, estas simpatie kaj interese aŭskulti homojn kun malsamaj akĉentoj (ofte la aŭtoron mem de la artikoloj), laŭtlegi la enhavon de nia revuo.

Ĉi-foje, nia ĉefartikolo traktas la projekton Amikumu. Kiam ĝi realiĝos, esperantistoj (kaj pli poste ankaŭ anoj de aliaj komunumoj) povas pli facile trovi unu la alian, ekzemple dum vojaĝo, simple uzante poŝtelefonon.

Ni krome regalos vin per intervjuo kun Pablo kaj Fran de *Babelo Filmoj*, kiujn vi konas verŝajne pro la fama kanto Dek bovinoj. Alia artikolo demandas, kie troviĝas la esperantistoj. Ni denove havas du rakontojn: unu estas tradicia rakonto el Persio, la alia estas pli moderna kaj temas pri Italio. La rakontoserio pri Grndulario daŭriĝos venontnumere.

Ni esperas, ke vi ŝatas tiun ĉi numeron de Umujo, kaj ni ĝojos pri viaj komentoj, kiujn vi povas komuniki al ni pere de Telegramo aŭ retpoŝte.

revuo.umujo@gmail.com



<https://goo.gl/oPdEfr>

La tuta enhavo de ĉi tiu revuo krom la bildo de la kovrilo, la bildoj de *Babelo Filmoj* en la paĝoj 10, 11, 12, 13 kaj 14, la emblemo de Amikumu! en la paĝoj 1 kaj 7 kaj la emblemoj de Google estas eldonata laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda (CC BY-SA 4.0), disponebla ĉe <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/deed.eo>.

La bildoj de *Babelo Filmoj* en la paĝoj 10, 11, 12, 13 kaj 14 estas sub kopirajto 2016 de Babelo filmoj, kun ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La bildo, kiu estas uzita sur la kovrilo, estas farita de Jcomp - Freepik.com, disponebla ĉe http://www.freepik.com/free-photo/hands-making-equipment_907993.htm

Kie troviĝas la esperantistoj?

de
Martin Haase

En la babilejo “Esperantujo” de nia preferata babil-aplikaĵo Telegramo, mi demandis: “En kiu parto de la mondo vi nuntempe troviĝas?” Per la roboto @vote (VoteBot) mi povis doni dek alternativajn respondojn, el kiuj ĉiu voĉdonanto povas elekti unu. Mi do listigis la kontinentojn laŭ Vikipedio (Afriko, Norda Ameriko, Suda Ameriko, Antarkto, Aŭstralio, Azio, Eŭropo) kaj aldonis Oceanion, kiu ne estas kontinento, sed la Oceanianoj, kiujn mi konas, preferas esti Oceanianoj ol esti aligitaj al la plej proksima kontinento. Kaj mi ja demandis pri mondopartoj kaj ne pri kontinentoj. Mi ne aldonis Centran Amerikon al mia listo, ĉar ĝi ne estis en Vikipedio kiel aparta mondoparto. Eble, mi eraris, ĉar kelkaj plendis pri la manko de Centra Ameriko. Mi krome aldonis la respondojn: “interkontinente vojaĝantaj”, ĉar tion esperantistoj emas fari, kaj “Aliloke”, ĉar eble mia listo ne kovras ĉiujn mondopartojn, por ne paroli pri eksterteraj esperantistoj (ekz. en la Internacia Spacstacio).

Respondis 155 personoj, la enketo do verŝajne estas reprezenta almenaŭ por la enretaj esperantistoj. La rezultoj estas interesaj: La plimulto troviĝas en Eŭropo (35 %), sekvas Norda kaj Suda Amerikoj – ambaŭ samkvante (23 %). Kiam mi lanĉis

la enketon, dum longa tempo ŝajnis, ke Suda Ameriko estas pli forta ol Norda Ameriko, sed finfine la procentaĵoj egaligis. La eble pli retemaj sudamerikanoj klakis pli frue ol siaj nordamerikaj samideanoj. Ĉu sudamerikanoj estas eble pli junaj? Cetere, mi supozas, ke la plimulto de la sudamerikanoj estas el Brazilo, kie – kiel konate – la esperanto-movado estas tre forta kaj vigla.

En Azio troviĝas 12 %, en Afriko 2 %. Pri la sekva rezulto mi havas fortajn dubojn: Ĉu vere 2 esperantistoj troviĝas en Antarkto (1 %)? Mi ne dubas, ke unu sciencisto tie scipovas Esperanton, sed se estas du, ili tuj fondu lokan aŭ pli bone kontinentan grupon! La aliaj mondopartoj ankaŭ enhavas nur malmultajn esperantistojn, kiuj partoprenis la enketon.

Kompreneble, mi esperas, ke Esperantujo.directory baldaŭ povas liveri pli precizajn procentaĵojn – eĉ laŭlandajn. Bedaŭrinde, tie mankas Antarkto.

PS.: Post multjara uzo de la vorto esperanto-parolantoj anstataŭ esperantistoj, mi revenis al ĉi-lasta, ĉar en la reta mondo, multaj partoprenantoj estas pli esperanto-skribantoj ol parolantoj. Mi kompreneble nun komprenas per esperantistoj ĉiujn uzantojn de Esperanto, kaj ne personojn, kiuj nur subtenas esperantismon, sen uzi Esperanton.

En kiu parto de la mondo vi nuntempe troviĝas?



Amikumu

Verkita de Evildea kaj Chuck Smith

Amikumu - Historio kaj Estonteco

La oftaj afiŝoj pri “Amikumu” verŝajne jam tedas multajn el vi. “Kial reklami telefonaplikaĵon (apon), se ĝi ankoraŭ ne ekzistas?” Tion ni jam kelkajn fojojn aŭdis. Kaj pro tio, ni devas plej humile pardonpeti. Tamen, ni samtempe esperas, ke leginte ĉi tiun artikolon, vi ekkomprenos, kial ni tion faras.

Kio estas Amikumu?

Amikumu estos apo (por iOS kaj Android), kiu helpos vin, trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn.

Kio estas la historio de Amikumu?

La ideo de Amikumu, ilo kiu povas montri kaj konekti esperantistojn, jam ekzistis delonge en la kapo de esperantistoj. Chuck Smith unue ekhavis ideon por GPS-ilo, vojaĝante tra Brazilo en 2002, sed ĝuste tiutempe tiu teknologio mankis. Aliflanke, Evildea kelkajn fojojn plendaĉis pri la manko de tia ilo ĉe sia jutuba kanalo.

Krome, aperis ludo tre konata: Pokémon GO. Chuck pensis, ke se oni povas kapti poŝmonstrojn telefone, kial ne “kapti” esperantistojn. Tiu ideo venis al li, kiam li vidis, ke Robin van der Vliet dum IJK ludis Pokemonon. Iam li vidis, ke Evildea estas enreta kaj entuziasme diris sian ideon. Evildea tuj respondis: “Mi fakte planis iri al investantoj venontmonate kun ĝuste tiu sama ideo!” Tiam ni eksciis, ke ni trovis la plejgrandan mankon nuntempe en la esperantista komunumo. Poste ni rimarkis, ke Esperantujo ne estas la sola komunumo, kiu havas la mankon ...

Do, ni du ne estas unikaj; tuj kiam ni anoncis la projekton en Telegramo, Chuck sidis dum tri horoj senlace respondante al plej diversaj demandoj. La demandoj daŭre alvenadis! Poste, ni kreis diversajn kontojn en [Fejsbuko](#), [Tvitero](#) kaj eĉ la rusa [VK](#). Envenis multaj retroŝtoj de foraj esperantistoj pri similaj nerealigitaj ideoj. La neceso

de Amikumu tuj evidentiĝis. Tiam ni decidis, ke estas tiom da postulo, ke ni prefere petu la monon por starigi la projekton de la komunumo mem, anstataŭ subaĉeti investantojn.

Kial Amikumu necesas?

Tuj evidentiĝas, kial kaj kiel Amikumu estas necesa ilo por la reta generacio de esperantistoj. Tamen, ne tuj evidentiĝas, ke Amikumu estas nova etapo en la evoluo de la esperanta ekonomio.

Amikumu estos la unua “vere internacia” per-esperanta, sed ne nur por-esperanta firmao ĝis nun. Ni klarigu la strategiplanon:

Fazo unu:

Amikumu estos nur por esperantistoj. Ni faras tion pro tri kialoj:

- 1) La tuta teamo estas esperantistoj.
- 2) Ni plej bone konas la esperanton.
- 3) Esperantistoj (espereble) pli pacience atendas nin, kiam ni testas kaj disponigas softvarajn solvojn.

Fazo du:

Amikumu disponiĝas al ĉiuj lingvaj grupoj.

1) Ni havas multe da atingpovo en la poliglota komunumo.

2) Ni volas helpi ĉiujn lingvojn, sendepende de tio, ĉu ili estas gigantantaj, minoritataj aŭ kreitaj.

Fazo tri:

Amikumu disponiĝas al ĉiuj. La kerna celo de Amikumu estas konektigi homojn. Tio signifas, ke oni povos uzi la apon por trovi aliajn personojn, kiuj havas similajn interesojn, hobiajn aŭ karierojn – tute ne gravas.

Amikumu, do, povas krei salajritajn postenojn por esperantistoj el la granda merkato de Neesperantujo. Esence, ju pli da homoj ni atingos, des pli forta ekonomie ni fariĝos kaj des pli serioze nian lingvon oni traktos.

Kiam Amikumu elŝuteblas?

Antaŭ ol ni povas liberigi la programon, ni devas financi la diversajn aspektojn de ĝi. Cele tion, la 18an de oktobro ni publikigos monkolekton ĉe Kickstarter. Fakte, ni jam ekhavis multajn sponsorojn, kiuj kovras parton de niaj elspezoj. Tiuj estas la Interkultura Centro Herzberg, Aŭstralia Esperanto-Asocio, Poliglota Konferenco, Polyglot

Gathering kaj Pasporta Servo. Ankaŭ ni gajnas la subtenon de kelkaj famaj poliglotoj, ekzemple Benny Lewis (Fluent in 3 Months) kaj Lindsay (Lindsay Does Languages).

Se ĉio iras laŭplane, oni povos elŝuti la apon frue en 2017

Kiel vi povas helpi?

Ni scias, ke ne ĉiuj kapablas financi nian projekton pro diversaj kialoj. Tamen, financado ne estas la sola maniero helpi nin. Vi povas aboni nian retleteron ĉe www.amikumu.com kaj diskonigi ĉiujn niajn afiŝojn; kaj inviti viajn amikojn al niaj sociaj paĝoj [Fejsbuko](#), [Tvitero](#) kaj [VK](#). Se vi konas aŭ havas blogon, gazet-kontaktojn aŭ podkaston, kontaktu nin por intervjuo ĉe info@amikumu.com. Kune ni okazigos la revolucion!



KPAK: PPAP en esperanto

Jen *KPAK*, la esperanta versio de la kanto *Pen Pineapple Apple Pen* kun filmo enhavante kelkajn anglajn parodiojn estas spektebla ĉe Youtube. Pablo Busto kantis ĝin kaj havigis al Esperantujo unu el la plej freŝaj aferoj, kiu en multaj lingvoj ankoraŭ ne ekzistas.

Ni invitas vin registri esperantajn parodiojn por havi tut-esperantan KPAK-on.



<https://www.youtube.com/watch?v=Q9XGEQZjAHo>

Jen la
krajono
Kaj jen la
pomo



Jen la
krajono
Jen
ananaso

Gestemo ne ĉiam estas bona eco ...

Renato

Italoj estas multe konataj eksterlande por esti tre gestemaj. Mi mem estas italo, kaj mi povus diri, ke ne ŝajnas al mi tiel, kaj mi pensas ke multaj italoj ne tiom gestemas, sed mi ankaŭ komprenas, ke, ĝuste pro mia italeco, mia opinio estas iom malgrava, kaj mi eble eĉ dirus tion gestadante senkonscie ...

Tia gestemo estas tiom fama, ke verŝajne, se oni demandus, kiel nomi italon kun manoj enpoŝe, ĉiu neitalo respondus "Mutulo". Sed alia signo de tiu fameco estas ŝercaĵo, kiun oni rakontas eksterlande (kompreneble, verŝajne de neniu italo vi aŭdos tion!), kaj facilege troviĝas ankaŭ interrete. Ĝi sonas pli malpli jene:

Du famegaj firmaoj konkuradas, kaj ilia konkuro estas tiom obstina, ke la ĉefaro de unu el la du iam decidas sendi tri el siaj plej fidataj dungitoj al la rivala firmao, por ke ili spionadu kaj malkovru sekretaĵojn pri la plej vendata rivala produktaĵo. Tiuj spionaj dungitoj estas ruso, franco kaj italo. Kiam konsentite, la tri spionoj iras al la rivala firmao kaj

ŝajnigas esti senlaboruloj, kiuj volas dungigi. La homoj, kiuj salutas ilin, vere kredas, ke ili deziras laboron, kaj ili sukcesas viziti la ĉefon de la firmao kaj dungigi ĉe li.

Dum la unuaj tagoj, ili multe kontentiĝas pro tio, ke ili enŝteliĝis, kaj multe klopodas serĉi la informojn, kiujn ili devas trovi. Tamen, unu tagon subite ili estas kaptataj de strangaj kapuĉuloj. Tiuj estas sekretaj detektivoj, kiujn la ĉefo sendis en la tutan firmaon, kiam li eksuspektis ilin pro ilia tiom zorga klopodado.

La spionoj do troviĝas en malgranda ĉelo, kiu estas en pli granda malhela ĉambro, kaj unu el la detektivoj trenas la francan spionon for de la ĉelo, ligas lin al seĝo, kaj demandas al li kial ili spionadas en la firmao. La franco restas muta, do la detektivo komencas torturi lin.

La franco multe krias pro doloro, kaj, post kvin minutoj de torturo, respondas al la detektivo, ke ili alvenis por spionadi pri produktaĵo. Kiam li diras tion, la detektivoj parolas inter si, kaj konsentas kontentiĝi per tio, kion li diris, kaj lasas lin iri. «Li estas preskaŭ mortinta, kaj ne diros ion plu. Ni povas fari aliajn demandojn al la aliaj», ili opiniis.

Ili do trenas la ruson for de la ĉelo, ligas ankaŭ lin al seĝo, kaj demandas al li, pri kiu produktaĵo ili spionadis. Ankaŭ la ruso ne volas respondi, kaj tial la detektivoj torturas ankaŭ lin. La ruso estas pli forta ol la franco, kaj restas neŝancelebla, sed, post unu horo de torturo, li finfine diras al la detektivoj la nomon de tiu produktaĵo, kaj la detektivoj liberigas ankaŭ lin.

Kiam li foriras de la firmao, li trovas la francon, kaj ili kune afliktiĝas. «Ni malsukcesis ... kaj ne nur ni seniluziigos nian ĉefaron kaj estos maldungitaj, sed certe la italo, kiu multe pli perfidemas ol ni, diros al ili de kiu firmao ni venas, kaj ili denunciros nian firmaon, kaj ĝi bankrotos», ili diras inter si. Ili ĉiuokaze konsentas

kune atendi, ĝis la italo diros ĉion al la detektivoj, kaj ili liberigos lin.

Ilia atendo daŭras multe pli ol antaŭvidite: pasas minutoj, dekoj da minutoj, horoj ... kaj post 12 horoj la italo foriras de la firmao, tute vundita pro torturo. La franco kaj la ruso tuj surpriziĝas kaj diras: «Kiom malbone vi aspektas! Ĉu vi ion diris?» La italo, elĉerpita, flustras: «Ne». La aliaj du subite ekĝojas: «Ŭaŭ! Eble ili ne povos denunci nin kaj ni ne perdos nian firmaon! Sed kial vi ne tuj respondis al ili? Vi certe povintus ŝpari tian torturon!» Kaj la italo respondas: «Verdire, mi provis diri ĉion ekde la komenco, sed ili ligis miajn manojn al la seĝo...»

Intervjuo kun Babelo Filmoj (Pablo kaj Fran)



Sassie


Umujo sendis kelkajn demandojn al la teamo de *Babelo Filmoj*: Pablo Busto (kantisto, verkisto, muzikisto) kaj Fran Lobato (desegnisto, scenaristo, filmisto).

Ŝajne jam de kelkaj jaroj Pablo interesigas pri porinfanaj kantoj. Kiel naskiĝis Babelo Filmoj? Kiel komenciĝis la kunlaborado?

Fran: *Babelo Filmoj* naskiĝis en aŭgusto 2015, kun la celo krei aŭdvidajn originalajn enhavojn en Esperanto, kaj kontribui per ili al la disvastigo de la internacia lingvo en nia urbo Seviljo (Hispanio). Nuntempe, la filmetoj estas grava ilo por la disvastigo. Se oni havas bonajn kaj interesajn filmetojn en via jutuba kanalo, oni havos dankemajn spektantojn

en la tuta mondo, kiuj povus rekomendi la verkojn al siaj amikoj, esperantistoj kaj ne-esperantistoj. Alia grava celo por *Babelo Filmoj* estas: krei esperantajn enhavojn, kiuj povas esti interesaj ne nur por esperantistoj. Ĉu ĝi estas utopio? Eble jes, sed se Evildea povas esti nia dio, kial li ne povas esti dio por ĉiuj? Kvankam ni ĵus elrampas el la ova ŝelo en Esperantujo, ni pensas, ke ĉio eblas. La kanto "Dek bovinoj" estas bona ekzemplo. Multe da niaj neesperantistaj amikoj zumas tiun ĉi kanton kaj konas kelkajn esperantajn vortojn dank' al ĝi.

Pablo: La kunlaborado komenciĝis kelkajn monatojn post la kreo



de *Babelo Filmoj*. Mi jam estis farinta kelkajn infankantojn, sed mi malkapablas fari bonajn filmojn, do mi serĉis videofariston por tiuj infankantoj. Post nia sensukcesa provo, labori kun homoj per anonco en Fejsbuko kaj Jutubo, Fran komencis labori per gantpupoj kaj alŝutis nian unuan filmeton "Saluton". La ĝenerala respondo estis tre pozitiva ĉe infanoj kaj ĉe plenkreskuloj, tial ni decidis daŭrigi la serion. Ĉiuj filmetoj de "Aventuroj de Uliso kaj Infanaj Kantoj" estas produktataj laŭ la sama maniero: Mi verkas kaj registras la kanton, kaj Fran produktas kaj faras la filmeton. Ni laboras hejme, en malsamaj urboj, tial nia komunikado okazas pere de interreto aŭ telefono. Tio ne estas problemo. Nia ĉefa

problemo estas la tempo. Ni ŝatus alŝuti videojn pli ofte, sed ne estas facile. Niaj projektoj ankaŭ estas motoroj por nia lernado. Krei kaj lerni samtempe, estas bona sistemo, kiam vi ne havas multan libertempon. Kvankam ĉio ne estos tiom sukcesa kiel "Dek bovinoj", ni provos fari pli bonajn kaj spektindajn kreaĵojn.

La kanto "Dek Bovinoj" havas internacian sukceson, precipe ĉe junuloj kaj plenkreskuloj. Vi iom miris pri tiu sukceso, ĉu ne? Ĉu vi povas imagi, kial ĝuste tiu kanto furoras?

Fran: Ni vere estas surprizitaj. Ekde la komenco multe da homoj interesiĝis pri la kanto kaj diskonigis ĝin. La granda akcepto, kiun havas Dek Bovinoj, povas



ŝuldiĝi al pluraj kialoj. Miaopinie, tio estas bona kanto, simpla kaj oreflata muziko. Kvankam estas infanaj kantoj, ni scias, ke la ĉefa spektantaro estas junuloj kaj plenkreskuloj. Multaj detaloj en la filmetoj estas desegnitaj pli por plenkreskuloj ol por infanoj. La kanto ankaŭ inkludas tekston, per kiu vi povas facile lerni la nombrojn en Esperanto. Tio estas grava afero por infanoj kaj komencantoj. La alia grava ingredienco devas esti la ĉefroluloj de la kanto: la bovinoj. Esperantistoj havas specialan simpatian por la bovinoj. Nuntempe, tiu freneza simpatio estas evidenta. Kiu junula aŭ plenkreskula esperantisto ne jam muĝis hodiaŭ?

Pablo: Tute surprizitaj, fakte. Eĉ kelkajn monatojn post la “furoro”, mi ankoraŭ miras, ke preskaŭ 50

homoj rigardas la filmon ĉiutage, kaj pro la versioj de la kanto, kiujn homoj faris... Pri la kialo de la sukceso mi multe pensis, kaj mi ankoraŭ ne bone komprenas ĝin. Eble la melodio, aŭ la filmo, kiu enhavas rakonton por la kanto... Eble, kiel diras Fran, la kialo estas la bovinoj mem. Mi cerbumis pri la demando, kiun beston uzi, kaj la besto kun plej internacia bleko, kiun mi trovis, estas bovino, do tiu estas la ĉefa kialo, kanti pri bovinoj. Cetere, la helpo de multaj homoj, kiuj aldonis subtekstojn al la filmo, helpas montri la kanton al neesperantistaj geamikoj.

Ĝenerale kiom da tempo via teamo bezonas, por ke nova filmeto aperu Jutube?

Fran: Malfacilas diri, kiom da tempo, ĉar ni uzas parton de nia



libera tempo. Ĝenerale, Pablo finas la muzikon eĉ monatojn antaŭ ol la video aperas Jutube. Mi provis eldoni unu filmeton ĉiun monaton, sed ne ĉiam eblis. Se vi rigardas la kontribuliston de la filmetoj, *Babelo Filmoj* ne havas multenombran teamon. Tio, kunligita kun okazaj komputilaj problemoj, povas malfruigi la laboron. Ankaŭ la subtekstoj en aliaj lingvoj forprenas tempon, kvankam ili realigeblas dank' al la helpo de multaj personoj. Ĝenerale, iliaj nomoj aŭ kaŝnomoj aperas ĉe la fino de la subteksto.

Pablo: Ankaŭ por mi estas malfacile, respondi tion. Ekzemple, la kanton "Eta araneo" mi faris sufiĉe rapide, aliajn kantojn mi skribas kaj strukturadas dum mi registras. Tio estas la plej malfacila parto por mi, poste, miksi ĉion estas iom pli facile, ĉar ne necesas silento hejme... Sed, por diri nombron, ĉiu kanto bezonas inter 10 kaj 20 horojn.

Ĉu vi povas iom klarigi vian kreadan procezon? Ĉu vi delonge havas ideon pri la aspekto de la filmetoj?

Pablo: Mi ĉefe uzas kantojn, kiujn mi jam konas, de kiam mi estis infano ("Saluton" kaj la bovinoj



estas esceptoj). Mi lernas ludi ilin per la gitaro, kaj tradukas, kantas, retradukas ĝis kiam ili estas kanteblaj. Poste, mi komencas la registradon kaj poste la miksadon. Mi sendas al Fran kelkajn kantojn, kaj li decidas la ordon por aperigi ilin, laŭ la eblo, fari la filmojn. Do, kutime, li prilaboras filmon, kiun mi finis antaŭ kelkajn monatojn.

Fran: Mia kreada procezo estas kutima por ajna aŭdvida produktado, kvankam klare laŭ malgranda skalo. Por ĉiu video, unue mi skribas rakonteton, surbaze de la kantoteksto kaj de la muziko. Poste, mi fabrikas la gantpupojn kaj dezajnas la dekoraciojn. Ĝis nun, mi estas laboranta, konsiderante ĉiujn filmetojn parto de sama rakonto, tial mi ripetas rolulojn kaj kelkajn dekoraciojn. Tiel, mi reduktas la produktadan tempon, kaj miaopinie la fina rezulto povas esti pli interesa. En la kantoj, la



komuna punkto estas, ke ili estas infanaj kantoj, skribitaj kaj kantitaj de Pablo, dum la videoj estas dezajnitaj kiel serio. Antaŭ la registrado, mi faros skizojn kun la ĉefaj scenoj, por havi ideon pri la pozicioj kaj movadoj de la gantpupoj. La registrado ne estas longa, nur unu aŭ du horojn por ĉiu ĉapitro. Finfine mi muntas la filmeton laŭ la komenca scenaro. Ĝenerale, la procezo estas tiel, kvankam ĉiu video povas havi siajn proprecojn.

Kiu estas via plej ŝatata kanto de *Babelo Filmoj*?

Pablo: Miaflanke, kiel kanto “Eta araneo”. Mi pli komfortas kun roka muziko. Pri la tuta filmaro, “Dek bovinoj” kaj “La krokodilo en la kavo”, ĉar ili ambaŭ havas bonan historion ekster la kanto.

Fran: Nedubeble “Dek Bovinoj”. Komence, Pablo montris al mi tiun kanton, kune kun “Saluton” kaj “Eta araneo”. Tial mi povas esti unu el tiuj plej afekciitaj per bovina viruso. Mi sciis, ke la bovino estus grava rolulo en la serio, sed mi ne pensis, ke tio atingus tian gradon de frenezo.



La ŝaho kaj la veziro

Tradukita de Saĝad Daŝti Neĵad

Laŭ tradicia popola persa fabelo

Vivis iam ŝaho, kies edzino estis la plej bela virino de la lando, sed malfeliĉe, la veziro de la ŝaho estis senhonta homo kaj volis proprigi al si la edzinon de la ŝaho. La veziro sciis, ke se la ŝaho scius lian sekreton, li tuj ordonos mortigi lin. Do la veziro ĉiam klopodis, ke neniu sciu lian sekreton kaj ĉiutage elpensis kaj planis iĝi ŝaho kaj sekve proprigi al si la virinon. Iun tagon, sperta derviŝo envenis la urbon. Li ĉiutage en la placo de la urbo faris miraklojn. Baldaŭ oni informis la ŝahon pri tiu ulo. La ŝaho vokis la veziron kaj ordonis al li iri al la derviŝo kaj vidi, kion li faras kaj kion li volas. La veziro iris al li kaj post

reveno diris: “Ho ŝaho, tiu homo scipovas fari kelkajn miraklojn kaj tiel ĉi enspezas.”

La ŝaho ordonis al la veziro iri kaj alporti la derviŝon al la reĝa palaco. La derviŝo en la palaco antaŭ la okuloj de la ŝaho kaj liaj kunuloj faris multajn miraklojn, sed ili ne plaĉis al la ŝaho kaj li petis pli mirindan aĵon. Do, la derviŝo diris, ke la ŝaho ordonu al ĉiuj aliaj eliri, por ke li montru ion mirindan, kion nenie la ŝaho vidos. Poste, la ŝaho kaj la derviŝo restis solaj unu kun la alia, kaj la derviŝo diris: “Ho ŝaho, mi povas eliri el mia korpo kaj eniri en alian korpon!” La ŝaho diris: “Kiel vi faros tion?” kaj la derviŝo diris:



“Ordonu, ke oni alportu kokon.” La ŝaho ordonis kaj oni alportis ĝin. La derviŝo sufokis la kokon. Poste la ŝaho vidis, ke subite la koko reviviĝis kaj samtempe la senviva korpo de la derviŝo falis sur la plankon. La ŝaho ektimante intencis voki servantojn, sed la koko falis kaj la derviŝo reviviĝis. La ŝaho tre miris kaj diris: “Ho derviŝo, instru min vian miraklon kaj mi donos al vi ĉion, kion vi volas.” La derviŝo respondis: “Mi volas 500 orajn monerojn. Sed vi devas ne instrui ĝin al alia kaj tiu ĉi afero devas resti sekreto.” La ŝaho akceptis kaj la derviŝo instruis al li la miraklon kaj petis, ke la ŝaho sendu la petitajn monerojn mez-nokte iel, kiel la veziro ne komprenu.

Ekde tiam, la ŝaho tute forlasis siajn taskojn kaj eniris en aliajn korpojn. La veziro ekkomprenis la aferon kaj iris al la derviŝo kaj diris al li: “Instruu min ankaŭ kaj mi donos al vi ĉion, kion vi volas.” La derviŝo amis la filinon de la

veziro kaj diris al li: “Mi instruos vin, sed vi devas akcepti min kiel vian bofilon. Mi amas vian filinon kaj mi volas edziĝi kun ŝi.” La veziro unue tute konsterniĝis, sed poste diris: “Morgaŭ venu kaj mi respondos al vi.” La veziro iris kaj parolis kun sia filino kaj klarigis la aferon al ŝi. La filino diris: “Kara patro, mi neniam faros tion, ĉar se aliaj scius, ke mi kun derviŝo geedziĝis, certe ili mokos min.” Kaj la veziro diris: “Ankaŭ mi malkonsentas, sed kion mi respondos al li?” La filino diris: “Diru al li, ke se vi volas akiri mian filinon, vi devas doni al mi 500 orajn monerojn. Komprenoble, li ne havas tiom da oraj moneroj.”

La sekvan matenon, la derviŝo revenis por ricevi respondon. La veziro petis 500 orajn monerojn, sed mirinde la derviŝo akceptis. Sed la veziro diris al si mem: “Mi povas lerni la miraklon kaj poste iel mi forigos lin de la urbo kaj ne akceptos ke li edziĝu kun mia

filino.” Kaj li diris sian penson al la filino kaj ŝi ankaŭ akceptis, do ili mensogante akceptis kaj la derviŝo instruis al la veziro la miraklon. La derviŝo, instruite la miraklon, volis kunporti la filinon, sed la veziro diris: “Mi estas veziro kaj kompreneble por mia filino volas grandan geedziĝfeston. Cetere, mi devas konsentigi la ŝahon, vi devas almenaŭ dum 40 tagoj atendi.” La derviŝo ne akceptis kaj ili komencis diskuton, sed la veziro saĝe direktis la diskuton al kverelo kaj tiam li diris, ke la derviŝo insultis la veziron kaj forigis lin de la urbo. La derviŝo, kiu estis amanto, iris sencele al dezerto.

Poste, la veziro iris al la ŝaho kaj diris: “Ho ŝaho, tio, kion vi scipovas ankaŭ mi scipovas, sed ne estas bone, fari ĝin tuttempe; se malbonuloj ekscios, ni certe havos problemojn.” La ŝaho akceptis kaj diris: “Ekde nun mi pli zorgos.” Kelkajn tagojn poste, la veziro proponis al la ŝaho la

jenon: “Ni iru al la ĉasejo kaj ĉasu. Sed duope, por ke se ni volos eniri en la korpon de vivaĵo, neniu komprenu.” Kaj la ŝaho akceptis. Ili kune iris al la ĉasejo. Tie ili vidis gazelon, la veziro ĉasis ĝin kaj diris al la ŝaho: “Ĉu vi jam eniris en la korpon de gazelo? Vere estas amuze.” Kaj la ŝaho respondis: “Ne, mi nun faros.” Kaj la ŝaho eniris en la korpon de la gazelo kaj lia senviva korpo falis sur la teron. Kaj la veziro tuj eniris en la korpon de la ŝaho kaj rapide iris al la proksima vilaĝo. Tie li diris al la vilaĝanoj: “Mi kaj la veziro kune ĉasadis, kaj subite li falis kaj mortis. Kvar uloj iru kaj kunportu lian korpon al lia hejmo kaj donu ĝin al lia familio.” Kaj li mem rapide iris al la ŝaha palaco kaj al la edzino de la ŝaho. La edzino vidante sian edzon tuj kuris al li, sed proksimiĝinte, ŝi sentis, ke nur lia aspekto estas kiel ŝia edzo kaj li ne havas la odoron de la ĉiama ŝaho. Ekde tiam la edzino de la ŝaho neniam emis esti kun li.

Kiam la ŝaho revenis kaj vidis la senvivan korpon de la veziro, li komprenis ĉion. Do, li timis, ke la veziro ĉasos lin kaj li rapide fuĝis al alia lando kaj arbaro, en kiu li vidis la senvivan korpon de papago sub arbo. Li tuj eniris en la korpon de la papago kaj flugis kaj ekvivis inter papagoj. Iun tagon, li vidis ĉasiston, iom proksimiĝis al li kaj vidis ke li estas tiu derviŝo, kiu instruis al ili la miraklon. Do, li iris al li kaj diris: “Kunportu min al la ŝaha palaco de la najbara lando, tie vi povos, vendante min, tre enspezi.” La ĉasisto, aŭdante la nomon de tiu lando kaj palaco, tre ĝojis kaj la parolo de la papago radiigis la lumon de espero en lia koro.

Do, la derviŝo kunportis la papagon al la palaco de tiu lando. Tie la falsa ŝaho dum multaj tagoj klopodis atingi la koron de la edzino, sed li ne sukcesis. Vidante la papagon, li do diris al si mem: “Eble, aĉetante tiun ĉi belan papagon por la edzino, mi povos

atingi ŝian koron.” Kaj li aĉetis ĝin kaj donis al la edzino. La veziro konis la derviŝon, sed silentis, por ke la deviŝo ne sciu, kion li faris. La papago, vidante sian edzinon, ekĝojis, sed vidis, ke ŝi tro malfortiĝis kaj maldikiĝis. Li demandis: “Kara sinjorino, kial vi tiel ĉi iĝis malforta kaj maldika?” Ŝi respondis: “Mi havas grandan ĉagrenon en mia koro, kiun mi al neniuj povas esprimi.” La papago diris: “Diru ĝin al mi.” Ŝi diris: “Kion vi povas fari?” La papago diris: “Eble, mi povos fari ion.” Finfine, la edzino ekparolis kaj diris: “Mi ja amis la ŝahon tiel, ke mi neniel povis elteni lian foreston. Sed iam, li kaj la veziro iris al la ĉasejo kaj post lia reveno, mi neniel povis senti mian antaŭan amon. Mi tute perdis ĝin kaj ne povas ami lin. Li ne havas la odoron de la ĉiama ŝaho, kvazaŭ li estus alia homo. Ekde tiam li faris ĉion, por ke mi amu lin, sed mi neniel povas ami lin. Mi jam ne havas deziron krom morton.” La papago diris:

“Karulino, proksimiĝu kaj flaru min.” Ŝi flaris kaj subite kriis: “Ho, tiu ĉiodoro estas ĝuste laodoro de la ŝaho.” La papago diris: “Mi mem estas la ŝaho.” kaj klarigis ĉion al ŝi. La virino poste demandis: “Nun kion ni devas fari?” La papago diris: “Nokte ne fermu la pordon de mia kaĝo. Kiam la veziro alvenos, iom afable parolu kun li. Diru al li, ke ekde la morto de via antaŭa veziro, vi ne plu estas kiel antaŭe kaj ne diras viajn sekretojn al mi. Komprenoble, li diros, ke li ne ŝanĝiĝis, tiam vi diru: “Vi promesis instrui al mi la lernitan miraklon de la derviŝo’. Kaj kiam li konsentos instrui la miraklon, ordonu, ke oni mortigu hundon kaj ke oni donu ĝin al vi. Kaj petu la veziron eniri en la hundon. Poste mi faros la ceteron.”

La edzino diris ĉion, kiel la papago diris, kaj la veziro ankaŭ akceptis. Kiam la veziro eniris en la korpon de la hundo, la ŝaho tuj eliris el la

korpo de la papago kaj eniris en sian veran korpon, staris kaj diris: “Ho malica veziro, kial vi faris tiel ĉi? Via destino estas ĉiam esti hundo kaj boji.” La edzino, vidante sian ĉiaman edzon, kuris al li kaj brakumis lin. La ŝaho ordonis ke oni voku la derviŝon, kaj faris lin sian veziron kaj donis la filinon de la antaŭa veziro al li.

Veziro: Oni en kelkaj mezorientaj landoj kiel Irano nomas ministron veziro. La radiko verŝajne venas el la araba .

Ŝaho: Oni en Irano nomas reĝon ŝaho

Derviŝo: Ano de islama ordeno. Derviŝoj ofte vojaĝas kaj estas senhejmaj.